

FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA
kaj de PATRONA ASOCIO „LEXICON SILVESTRE“ R.A.

Nr. 35 Eberswalde, 1997-04-01

1. Informo pri la venonta membrokunvo de "Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.A.," je 1997-10-17, komenco 14a horo, en Faka Altlernejo Eberswalde, Alfred-Möller-Straße 1.

Tagordo:

1. Akcepto de la jarraporto de la direkcia konsilio
2. Raporto de la kasrevizorino
3. Malŝarĝo de la direkcia konsilio
4. Elekto de la direkcia konsilio
5. Elekto de la kasrevizoro
6. Decido pri la akcepto aŭ rifuzo de deklaroj pri membriĝo
7. Kromaj problemoj

(Vatidas kiel oficiala invito por la asocioj).

2. Invito

Ni invitas vin al la tradicia komuna aranĝo de IFRE kaj de Patrona Asocio komune kun Kulturligo Eberswalde. La kunveno servu al la interŝanĝo de spertoj ĉe la prilaborado de "Lexicon silvestre" kaj ebligu informiĝi pri forstaj aferoj, kiuj estas interesaj trans landlimojn.

Termino: 17a de oktobro 1997 je la 15a horo.
Loko: Aŭditorio de Fachhochschule Eberswalde,
Alfred-,Möller-Straße 1

Tagordo:

1. Prof. Dr. V. Glavac-. Pri la forstmastrumado en la nuna Kroatio
2. Wera Blanke: Pri la kontribuo de interlingvistoj al la organizado de internacia terminologia labora
3. Roland Schnell: interplektita pensado en la lingvistiko kaj sia realigo en teknikaj sistemoj
4. Dr. Simon/Dr. Weckwerth: Progreso kaj ekkonoj dum la taboro pri "Lexicon silvestre" en 1997
5. Klaus-Peter Weidner: Koncepto pri la programado por la "Lexicon"-projekto

Ni petas vin, ke vi aliĝu ĝis 07.10.97 kaj ke vi anoncu vian deziron pri loĝado ĝis 1997-09-01.

Atentu:

Je la 15a/16a de oktobro 1997 okazos en b Altlernejo Eberswalde la "2aj tagoj pri esploro kaj instruo en Brandenburg".

3. Librofero

Nuntempe ni ofertas por aĉeto la sekvajn partojn de "Lexicon silvestre, Prima Pars" (Ls):

Titolo	ISBN	Prezo (DM)
Ls, Wörterbuch des Forstwesens, Deutscher Teil (1 de) mit Definitionen. X, 118 S., 2. Auflage, 1996	3-931 262-11-1	50,00
Ls, Dictionnaire de foresterie, Partie française (l fr) avec des définitions. X, 125 S., 2me édition, 1996	3-931 262-05-7	50,00
Ls, Dictionary of Forest Affairs, English Part (1 en) with definitions. X, 125 S., Second Edition, 1997	3-931 262-20-0	50,00
Ls, Dictionary of Forest Affairs, English Part (1 en) with definitions. X, 125 S., Second Edition, Paperback 1997	3-931 262-17-0	30,00
Ls, Vortaro de forsta fako, Esperantlingva parto (l eo) kun difinoj. X, 84 S., 1996, Dua eldono, 1997	3-931 262-21-9	50,00
Ls, Vortaro de forsta fako, Esperantlingva parto (l eo) kun difinoj. X, 84 S., 1996, Dua eldono. Paperback. 1997	3-931 262-16-2	25,00
Ls, Dictionar forestier, Parte română (1 ro.), X, 52 S., 1997	3-931 2262-10-3	20,00
Ls, Meža nozares vārdnīca, Latviskā dala (1 lv), X, 51 S., 1997	3-931 262-15-4	20,00

Ekde septembro estos haveblaj:

Ls, Šumarski riječnik, Hrvatski dic sa definicijama (1 hr), X, 94 S., 1997	3-931 2262-18-9	50,00
Ls, Slovník lesnictvá, Český čásk s definicemi (l cs), X., 1997	3-931 2621-19-7	50,00

La lingvaj versioj por la bulgara, hispana, rusa kaj la 2a eldono por la pola lingvo estas en preparo.

Home page kun mendoformularo estas uzebla per:

<http://www.fh-eberswalde.de>

Aldonaĵoj:

- 1) Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.A.: Jarraporto 1996 de Direkcia Konsilio
- 2) Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.A.: Jarraporto de la trezoristo. Kasraporto por la jaro 1996
- 3) Portmann, D.: La mezurvortoj en la faklingvo de Esperanto: Kiel forigi la "ec"-malsanon?

Aldonaĵo 3

Portmann, Dong: La mezurvortoj en la faklingvo de Esperanto-. Kiel forigi la "ec"-malsanon?

Mallonga resumo

1. Oni strikte distingu inter mezurvortoj . (MV, interligitaj kun nombro, mezuro, kaj kvalitivortoj (KV), esprimataj kvaliton, econ, staton, epitecon
2. Mezurvortoj povas esti substantivoj, adjektivoj, verboj aŭ adverboj.
3. Kvalitivortoj estas karakterizitaj por substantivoj per la sufikso "-ec", por adjektivoj per "-(ec)a".
4. Substantiva "ec"-vortoj estas laŭ karaktero mezurvortoj, se sia baza formo estas okupita per alia signifo. Ili estas sekundaraj mezurvortoj (MVS).
5. La terminofarado de kunmetitaj terminoj okazu en logika maniero laŭ la elmontritaj reguloj.

Al ĉiu punktoj estas cititaj ekzemploj.

Krome estas faritaj kelkaj aldonaj rimarkoj kaj kompletigaj proponoj.

Aldonaĵo 1

Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.A.
- Direkcia Konsilio -

Eberswalde, 97-02-97

Jarraporto 1996 de Direkcia Konsilio

1. Rajtaj kaj juraj okazintaĵoj

Laŭ informo de la Impostoficejo Eberswalde la „Deklaro pri liberigo” de korporacia kaj industria imposto, aprobita por la jaroj 1993 kaj 1994, ankoraŭ validas por pliaj tri jaroj. Por la novaj membroj de la Direkcia Konsilio, Prof. Dr. Jülich kaj s-ion Reimann, la subskriboj estas deponitaj ĉe la Tribunalo de la unua instanco.

1.2. Internaj okazintaĵoj

Je la 96-09-20, okazis membrokunveno kun malŝarĝo de la malnova Direkcia Konsilio kaj baloto de nova. La kunveno estis ligita kun la prelegaranĝo „forstfaka terminologia laboro 1996”. 1996 estas akceptitaj unu nova rmemoro. La asocio havis je la jarfino 37 membrojn.

2. Agadoj de Asocio

La Direkcia Konsilio povis direkti tre senpere la aferojn de la Asocio per siaj regulaj kunvenoj. Ekde la kunveno de la Konsilio je la 95-05-02 ni skribas ankaŭ protokolojn. Tiel ni atingis pli bonan kontrolon de niaj decidoj.

2.1. Subtenado de la laboroj pri "Lexicon silvestre" (Ls)

La laborojn pri ia "Lexicon" ni daŭrgis kiel antaŭe per la honorofica agado de la multaj diligentaj kunlaborantoj.

La taskojn de Eberswalda Lexicon-silvestre-centralo plenumis laŭpove d-ro Simon, d-ro Weckwerth kaj s-ion Müller. Pri tio ni havis la subtenon de pliaj honoroficaj kunlaborantoj, iam, pagitaj de la Laboroficejo Eberswalde. Speciale ni nomas s-inon Reimann kiel interpretistino, s-ron Weidner, kiu konstante vartas niajn komputorojn kaj programojn, krome s-ron Schleif, s-inon Hafemann, s-inon Jähnig. S-ino Henze subtenas nin ĉe la deklaro de Asocio por la financoficejo. Krom ili ni dankas ĉiloke la pli ol 100 fak- kaj lingvo-kunlaborantojn, kiuj parte dum multaj jaroj ofertas sian tempon por la Lexicon-silvestre-projekto.

En 1996 la laboroj koncentriĝis al la eldono de pliaj lingvaj versioj de "Prima Pars". La difinoj de la dua kaj tria partoj de la Ls estis plu prilaborataj. Ankaŭ en la jaro 1995 ni sukcese daŭrigis la ĉiujarajn prelegaranĝojn de Patrona Asocio kune kun Kulturligo kaj Esperanto-asocioj. Sed la ekonomie streĉita situacio ne ebligis 1996 personan partoprenon de eksterlandaj interesuloj.

Direkcia Konsilio tre dankas pro la donacoj, kiujn la Asocio ricevis en la jaro 1996. Precipe la multnombro de la donacintoj plenumis nin per ĝojo. La financa raporto montros la detalojn.

2.2. Rilatoj al la publiko

Grava kuntribuo, publike konigi la "Lexicon", estis plenumita per la partopreno de d-ro Simon, en kelkaj internaciaj kaj naciaj aranĝoj:

- En julio sur la 81a Universala Kongreso en Prango la "Lexicon" -volumoj povas prezentitaj kaj ankaŭ kelkaj estis venditaj;
- En septembro ni povis esti prezentataj nin per afiŝoj kaj la Ls-volumoj dum la jar-kunveno de la Germana Forst-Asocio en Berlin.
- En novembro dum la jarkunveno de la "Asocio pro Lingvistiko" prelego pei Ls estis farita. La diskuto pruvis la intereson de la ĉeestantoj.

Okaze de tiuj ĉi aranĝoj ni povis renovigi multjan kontaktojn al kunlaborantoj kaj simpatizantoj kaj novajn kontaktojn evoluigi. Ankaŭ en 1995 ni povis eldoni du numerojn de "Forstista Informilo" (FI.) kiel komunan publikig-organon de IFRE- kaj Patrona Asocio. Per la komplezo de la Altlernejo Eberswalde ni povis instali "home-page" de la Patrona Asocio celante ĝeneralan informon en internet.

Ni estis konigitaj kun kelkaj recenzoj pri Ls: En "Centralblatt für das gesamte Forstwesen" 113(1996) ¾, en "Beiträge für die Forstwirtschaft und Landschaftsökologie" 30(1996) 2, en "AF7/Der Wald" (1996) 6 kaj "Forstinfo" (1996)6.

Ni sendis al pli ol 1000 bibliotekoj kaj personoj en la mondo Libroofertojn por la "Lexicon". En la jaro 1996 estis venditaj 170 ekzemplaroj.

2.3. Rilatoj al personoj kaj organoj de la publiko

En 1996 la Fakultlernejo Eberswalde proponis kadre de la "LEONARDO"-programo de EU proponon pri pilotprojekto "Lingva instrumaterialo por studentoj kaj laborantoj de la forstmastrumado, pejzaĝouzado kaj naturprotekto" por recevi finanĉan subtenon. Kiel kunagantoj ni povis akiri la Federacian Forstinstituton en Hamburg, la Altlernejon ENGREF en Nancy, la Fakultlernejon Kotka, Finnlando, BSC-International en Mikkeli, Finnlando, kaj la Laboration por Forstutiligo enThessaloniki, Grekio. La proponon oni rnalaprobis.

Direkcia Konsilio

Aldonaĵo 2

Jarraporto de la trezoristo
Kasraporto por la jaro 1996
 de Patrona Asocio „Lexicon silvestre” r.A.

	DM
Saldo de 96-01-02	+ 4.341,55
Enspezoj entute	+ 18.151,83
Elspezoj entute	- 20.829,50
Saldo de 96-12-31	+ 1.663,88

Enspezoj detale:

Membr oktizoj	440,00
Donacoj	2.828,40
Vendado de „Lexicon“	8.648,08
Vendado de elektrona vortaro	1.000,00
Pruntaĵo	5.000,00
Reĝirado de ĝenerala imposto	225,33
Partoprenkotizo	10,00
Rento	0,02
Sumo:	18.151,83

Elspezoj detale

Kostoj por Compu-Serve	188,74
Poŝtmarkoj/poŝtkostoj	2.539,25
Komputerpartoj	3.197,07
Softvaro	1.621,08
CD-Rom-registratoro+krudaj laborpartoj	4.548,42
Evolu-kartoĉo, tambur-kartoĉo	923,62
Inkebendoj, diskedoj	91,80
Papero, kuvertoj, materialo por oficejo	98,25
Presado kaj bindado de vortaroj	4.044,60
Vojaĝkostoj (presado) + folioj	2.961,74
Kontokostoj	143,25
Pagoj por notario	28,18
Telefonkostoj	330,61
Librofoiro Ĉinio	75,00
Kostoj por libromarkato	37,89
Sumo:	20.829,50

La bonhavajo konstistas el:

En konto 96-12-31	1.161,93
En la mankaso 96-12-31	501,95
Sumo:	1.663,88

Donacoj 1996

Por Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ r.A.
 (ordigita laŭ german alfabeto)

Nomo	DM
Behm	20,00
Hafemann	30,00
Henze	10,00
Jähnig	30,00
Prof. Jülich	30,00
Meier	130,00
Morgenstern	100,00
Pachter	1.512,00
Prof. Quednau	30,00
Dr. Simon	478,40
Schrader	80,00
Ullrich	30,00
Winkelmann	10,00
Sumo:	2.828,40

Ekzistas nepagitaj fakturoj por la vendado de „Lexicon“ kun sumo entute de 1.568,38 DM.

Aldonaĵo 3

La mezurvortoj en la faklingvo de Esperanto: Kiel forigi la "ec"-malsanon

PORTMANN, Doug:

(Resumo por la laboro de TKI)

Oni povas principe konsenti kun PORTMANN pri la "ec"-rilataj klarigoj en lia traktato. Por la terminologia laborado ĉe la verkado de LEXICON SILVESTRE /Esperanto-versio/ oni povas, resumante, rekomendi la sekvajn regulojn:

1. Strikta distingo inter

1.1. Termino (nocio) interligita kun nombro, mezuro
= MEZURVORTO (MV)

Pri MV temas,

a) se mezuro, esprimanta kvanton, estas almetita al ĝi:

La alto de la arbo estas 20 metroj

La forto de tiu traktoro egalas al 200 ĉevaloj.

b) se ĝi estas karakterizata per mezuro kaj/aŭ sole mezur-unuo (fizika granda) aŭ se mezuro (nombro) estas subkomprenijenda:

fleksrezisto de 25 MPa La alto [kiu estas 20m] da la arbo

fleksrezisto indikata en Mpa

brutta denso de 600 kg/m³

brutta denso indikata en kg/m³

1.2. Termino (nocio), esprimanta kvaliton, staton, epiteton

= KVALITVORTO (KV)

La alteco de la arbo impresis la fakulojn.

La fortecon de tiu traktoro mirigis ĉiujn ekspertojn.

Kvalitvorto havas efikon aŭ rezulton.

2. Mezurvorto (MV) povas esti substantivo (a), adjektivo (b), verbo (c) aŭ adverbo (d):

a) La alto de la arbo sumiĝas je 20 metroj.

La arbo havas 20 metrojn da alto

b) La arbo estas 20 metrojn alta.

aŭ: La arbo estas alta 20 metrojn.

aŭ: La arbo estas alta je 20 metroj.

c) La arbo altas 20 metrojn.

a) Laŭalte la arbo estas 20 metroj.

3. Kvalitvorto estas karakterizata

por substantivo per la sufikso -ec (a)

por adjektivo per la adjektiva finaĵo

(baza adjektiva radiko) -a (b)

aŭ per la sufikso -ec + adjektiva finaĵo -a (c)

a) La denseco de la arbaro malhelpis traŭradon.

b) La densa arbaro malhelpis traŭradon.

c) La ŝtoneca (=ŝtonoza) vojo malfaciligis nian marŝadon.

(ŝtonhava, stato de vojo, vojo havanta (multajn) ŝtonojn sur sia supraĵo, **eco** de vojo!)

sed: ŝtona vojo estas pli fortika ol tervojo.

(ŝtona vojo = vojo (konstruita) el ŝtonoi, ŝtonvojo)

4. Substantivaj "ec"- terminoj (vortoj)

estas laŭ la karaktero Mezurvortoj (MV), se sia baza formo estas okupita per alia signifo. Ili estas sekundaraj mezurvortoj (MVS).

acideco - acido
 kurbeco - kurbo
 poreco - poro
 bufreco - bufro

5. La terminofarado de kunmetitaj (substantivaj)

terminoj okazu en **logika** maniero laŭ la ĉi-supraj reguloj, konsiderante la ĝenerale validajn regulojn de E-vortfarado kaj vortanalizo (PAG), plue la liberan terminofaradon (ULLRICH). Logika terminofarado havu prioritaton kaj eventuale povas deflankiĝi de la regulo.

Flankelemento kiel mezurvorto (MV):

rapidomezurilo	}	= mezurilo de (por) rapido
(rapidometro)		
rapidomezurilo		
(rapidmetro)		
		≠ rapida mezurilo* = $\hat{}$ rapide mezuranta ilo

+ rapidecomezurilo, rapideco-mezurilo aŭ
 rapidecmezurilo, rapidec-mezurilo

Flankelemento kiel sekundara mezurvorto (MVS):

acidecoindikilo, acideco-indikilo
 acidecindikilo, acidec-indikilo

Libera terminofarado (LTF):

rapido-mezurilo**	}	= rapida mezurilo
rapid-mezurilo		